# *Díaz-Canel: la laborvizita ciklo ebligis konstati la landan scenejon*



**Miguel  Díaz-Canel en la centra provinco Cienfuegos.**

Cienfuegos, feb 5 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel resumis en tiu ?i centra provinco la tutlandan trairon komencitan la 18-an de januaro por kunsidi kun la lokaj a?toritatuloj, kio ebligis pritrakti temojn kompleksajn kaj  konstati la landan scenejon.

Krome, li asertis, tiuj ?i vizitoj helpis “konstati grupon da opinioj pri diversaj aspektoj kaj pli profundigi aliajn. ?i kondukis nin al propono pri al?ustigo, korektoj kaj proponoj por novaj temoj, kiujn ni devas

pritrakti alidimensie en la venontaj semajnoj; kaj konstrui konsenton inter ?iuj laborstrukturoj de la partio, la registaro, la amasaj organizoj kaj la produktiva sistemo por eltrovi la rolon, kiu apartenas al ?iu kaj pli efike kaj kohere labori pri tiuj ?i temoj”.

Li konsideris ke pri la Ordiga Tasko “ni travivis divers-specajn problemojn: unu estas la nesufi?a preparo de kelkaj gvidantoj-?efe en la entreprena sektoro-, kio provokis malkorektan interpreton de la normoj, kaj samtempe, malkorektan starigon de difinitaj aspektoj.”

Li klarigis ke tiu ?i Tasko anta?vidas impulsi la landon,  ordigi la ekonomion kaj fari ?in pli travidebla,  superi la importan pensmanieron kaj favori eksportan pensmanieron, ser?i efikecon, distribui la? la socialista principo, tio estas, kiu pli alportas kaj laboras efike, des pli ricevas, tio estas, gajnas pli.

Tiu ?i Tasko plu tenas la principon de socia justeco de la Revolucio, sen egalecismo. Ni ne subvencias produktojn por ?iuj, ni subvencias kaj donas diferencigajn traktojn al vundeblaj homoj.

Kompreneble, la unua celo estas garantii ke ?iu homo havu laboron kaj kiel sekvo de ties kontribuo, tiam ricevu salajron, kiu permesos vivi dece, emfazis la prezidento.

Li konkludis ke “nun indas pritraksi februaron, estas monato de observado kaj atento cele al perfektigo de la Tasko, ?ar estos la unua monato kiam la homoj vidos sian kompletan salajron, ?ar ne estas la likvido de ferioj, kaj jam oni faris al?ustigojn, jam estas la prezoj pli malpli en la unua momento, kaj ?iuj faras siajn kalkulojn.

Kaj kompreneble, la entreprena sistemo havas multon por cerbumi, redesegni kaj rekonstrui, ?efe cele al efikeco, kiu estis, niaopinie, la fokuso mankinta en la entreprena sistemo ?enerale. La homoj parolas aparte pri prezoj, kostoj kaj salajroj, sed ne trovas la rilaton inter tiuj elementoj surbaze de rigora analizo ekonomia bazita en la efikeco.”

Pro la volo eltrovita, la maniero kiel la institucioj reagis post la unuaj sekvoj de la temo, la procezo i?is pli klara, kaj mi estas konvinkita ke la ordigo estis necesa kaj ni ne povis pli atenti por ?in apliki.

La fakto ke nun ekzistas alispeca diskuto rilate al la ekonomiaj problemoj, ke ni vidas ?ion alimaniere, ke estas miloj da homoj ser?ante laboron, ke ekzistas institucioj cerbumante kiel redesegni siajn procezojn, tio donas al ni gajnon kies rezulto multobli?os estontece, konkludis la kuba prezidento.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/246833-diaz-canel-la-laborvizita-ciklo-ebligis-konstati-la-landan-scenejon

**Radio Habana Cuba**